


# VERDA VOĈO DE DOKSY

Bulteno de Somera Kolegio de Esperanto en Doksy. Aperas laŭbezone.

## F L O R A J L U D O J

En Doksy okazos - jam la sepan fojon - landa belarta konkurso "Floraj Ludoj".
La ideo de Fl.L.devenas el la kutimo de la kataluna nacio,kiu ĉiujare arangas konkurson,ĉe kiu oni premias originalajn poemojn,prikantantajn la amon al la patrujo,al la virino kaj al la homo.La premiitoj ricevas florojn kaj librojn.Elektitaj poemoj farigas poste naciaj kantoj, kiuj rapide disvastigas tra la tuta lando,pliriĉigante la nacian kulturon.

Okaze de la V-a Universala Kongreso de Esperanto 1909 en kataluna ĉefurbo Barcelona esperantigis la prepara komitato ĉi-kutimon por pliriĉigi la kongresan programon.Oni arangis "Internaciajn Florajn Ludojn" , kiujn partoprenis por la originalaj poeziaĵoj samideanoj el la tuta mondo.Unua esperanta poetino Mario Hankel el Dresdeno,prezidantino de la Esperantista Literatura Asocio,elektita "regino" de la I.F.L.,transdonis al la diverslandaj laŭreatoj premiojn florajn kaj librajn.La impresa kataluna kongresa okazintaĵo estis poste dum multaj jaroj forgesata! - -
Nur en la j.1948 Somera Kolegio de Esperanto en Doksy revivigis la "Florajn Ludojn".Ses belartajn konkursojn /1948-52 kaj 1954/ partoprenis 28 aŭtoroj per 78 kontribuaĵoj /poemoj,prozaĵoj,tradukaĵoj kaj komponaĵoj/. La laŭreatoj ricevis diplomojn,florojn kaj monpremiojn.
La VII-aj Floraj Ludoj okazos dum la ĉi-jara kursaro de la Somera Kolegio de Esperanto en Doksy je temoj:"Somera Kolegio de Esperanto en Doksy", "Mácha - lago", "Societa esperantista vivo en Doksy".Pluraj informoj sekvos en la venonta Verda Voĉo.Partopreni la konkurson /originalaj poemoj kaj prozaĵoj/ rajtas ĉiuj kolegianoj estintaj kaj nunaj gekursanoj kaj kursaj instruistoj.
Jen, gesamideanoj, penu iĝi "floraj ludantoj"!

Pi

- - - -

! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! !
UTILIGU LA ALMETITAN ALIĜPROSPEKTON,ALIĜU AŬ ALIGU VIAJN GEKONATULOJN!
x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x

NOVAĴOJ EL DOKSY :
KURSO POR INFANOJ 6 - 10 jaraj okazos,se aliĝos sufiĉa nombro de infanoj. En nea kazo oni la aliĝintajn aligos en la kurson por komencantoj.
VARTEJO por infanoj de la 3-a ĝis la 6-a jaro estas projektata.Kotizo por infano estas 20 Kčs.

- -

GRAVA ADRESO /por aliĝoj kaj informoj/: Letní Kolej Esperanta v Doksech u Máchova jezera, Moskevská 453. _ _ _